GISTO-OKT-2003.

Georgo Otto Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS

otto@caiweb.com.br

INVITO

Jen letero de mi sendita al la revuo Esperanto. Gesamideanoj kiuj bonvolas helpe substreki la enhavon de chi suba teksto povus samtteme leteri rekte al lia mosxto Karoj Vojtíla, la Papo.

Malferma letero
al Lia Papa Moŝto Johano Paŭlo II
Vatikano - Romo – Italio.
En la revuo ESPERANTO – Fakso: 31 10 436 1751

Nome de geamikoj el la suda regiono de Brazilo kaj mianome, ardajn komplimentojn pro via 25-jara regado de la Katolika Eklezio kaj via rezistokapablo, malgrau ke vi suferis atencojn sed restas firme sur via laborposteno!

Respektoplene mi adresas al via sankteco ĉi-teksto kaj petas prikonsideri la menciitajn faktojn. Malgraŭ la multaj leteroj de vi lastatempe ricevitaj, enhavantaj petojn, ke vi potence impetu la tutmondan Esperantomovadon, oni rimarkis neniun konkretan rezulton. Okazas ke neniam plu la E-movado kalkulos je papo, kapabla kiel vi, konstati la valoron de la neŭtrala lingvo Esperanto. Tial oni tre timas ke, pro via alta aĝo, vi forpasos antaŭ ol okazos via konkreta subteno al nia nobla idealo: unika ponto inter ĉiuj popoloj. Oni abomenas la ideon, ke vi perdos tian ŝancon.

Indas memori ke nia anaro aktivas en 115 landoj. Inter ili troviĝas loĝantaroj kiuj tute ne konsentas kun la kristana kredo. Krome, kalkulendas milionoj da kristanoj kiuj ne konsentas kun via firma decido malpermesi naskolimigon per scienca artifiko, malgraŭ ke multaj milionoj da brazilaj, afrikaj kaj alilandaj beboj suferegas malsanojn kaj mortas pro malsato kaj manko de akvo, pro troloĝateco.

Observeblas ke la Katolika Eklezio estas kvazaŭ ŝtono en la ŝuoj de la kapitalisma ĉeflando kaj, malgraŭ la ŝajna favorkoreco, ĝi preferus frakasi ĝin. Mi petas al vi konsideri la eblecon ke la esperantistaro, senilúziiĝinta pro via ne sufiĉa apogo al Esperanto, povus alianciĝi kun la multiĝantaj islamaj organizaĵoj kaj fermenti, en 115 landoj, kontraŭ la katolikaj.

Oni tre esperas ke via klera moŝto tenu la tutan esperantistaron unuiĝinta pere de via saĝa rimedo: rekomendo al ĉiuj paroĥestroj, ke ili insistu instruigi Esperanton en siaj komunumoj. _ Altestime, katolika admiranto de via fruktodona papado. – (Signaturo).

ITV = Internacia Televido.

Surprizo agrabla furoras en INTERNET: oni piochas, brazilaj kaj kanadaj samideanoj, cele funkciigi televizion kiu funkcios tute en Esperanto...ba!...chu ni rajtas revi pri la fina venko pere de televidaj programoj? – Tio kompreneble dependas de valora helpo far nia tuta komunumo. Divenu kiom chiu aktivulo devos elposxigi, por teni aktiva ITVn. Chu 100 USD, chu 50 Euroj dum ses monatoj? – Kvankam ne tiom, sufiche altan stakon da Realoj por triamondanoj. BV interesigxi pri detaloj. Lau mia opinio kaj gxis oni havigos al si klaran ideon pri la entrepreno, ni devus investi por ses monatoj kun daurigo, se la afero montrigxos sukcesa.

SAGXA ELTURNIGXO

Post kiam la german-usona fizikisto Albert Ajnsxtajn famigxis, li estis ofte invitata priparoli sian teorion de korpusoj en movado, konata kiel Relativeca Teorio. Li tênis privatan veturigiston. Iam la du survoje al fora urbo, la sxoforo riskis diri al Ajnsxtajn ke, pro tiomfoja cheesto al liaj prelegoj, li estus kapabla prezenti lian teorion al audantaro.

- Chu vere? Plachus al mi testi vian lekciadon. En la apruata universitato neniu konas min persone. Vi anstatau mi prezentigxos al la rektoro. Proponite, farite. Ajnsxtajn surmetis la kepon de la veturigisto, akompanis la "konferenciston" em la auditorion kaj sidigxis inter la lastaj vicoj de cheestantoj. La konferenco okazis glate tamen, post la fino iu profesoro petis adresi al li komplikan matematikan problemon rilate al fiziko. Nia "Ajnsxtajn" ne tremis. Li tuj diris: ach, eminenta professoro, via demando havas facilan respondon, tre facilan. Ech mia sxoforo scias respondi gxin. Tuj vi havos konfirmon... hej, mia veturigisto, montro vian scion al la cheestantaro.

MASKOBALO.

Vespere okzos grandioza maskobalo. Geedzoj devis decidigxi, chu partopreni au ne. Li klinis iri kaj insistis ke ambau iru kune. Sxi ne plene bonfartis kaj diris, ke li iru sola. - Iru, amuzigxu ...sed, prudenton, chu?!

Do li prenis siajn fantazivestojn kaj eniris la festan ejon. Tie li trovis malnovajn kompanojn por kartludoj. Ili interkonsentis retirigxi al trankvila loko...en la kuirejo, kaj pokervetis. Iom antau noktomezo, enpreninte kuracilon, la edzino sentis sin resanigita kaj, pelata de scivolemo, kiel freneze petolas sia kara edzo, prenis sian fantazion, ie sxangxis la vestojn kaj enmiksigxis en la popolamason. Eleganta figuron sxi havis kaj baldau okazis flerto, kun sxia edzo char lian fantazion sxi konis. Ili gxoje amindumis. Post iom da tempo li invitis sxin promeni ekstere en la bela lunluma nokto. Ne bezone diri ke en auto okazis memorinda amorado. Post tio li lasis sxin elautigxi antau sxia domo. Enirinte, sxi enlitigxis kaj prenis legolibron dum li metis la auton en la garagxon. Post kelkaj minutoj envenas la edzo. Sxi demandis – Nu, kiel plachis al vi la balo? Li diris – Verdire mi malmulton vidis de la festo. Kun tri kolegoj ni kasxigxis en la kuirejo kaj entuziasme katludis gxis antau duonhoro. Mian fantazion mi pruntedonis al amiko laborkolego, kiu dancis dum la tuta festo.

ĈRI - RIO

JOSÉ LINHARES, 137/401

RJ / RJ